ESPERANTO ★ TRIUMFONTA ★

Nova titolo post 1 januaro 1925: „Heroldo de Esperanto“.

Semajna esperantista ĵurnalo, aperos post 1 decembro 1924 dufoje en la semajno (merkrede kaj sabate).

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, advokato, Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
I. Giff Norta, komercisto, Barcelona
H. Fischer, grandindustriisto, Bucureŝti
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrikdirektoro, Kaunas.

N-o 216
2. 11. 1924

Redakcio:
Ĉefredaktoro: *Teo Jung.*
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj *M. Butin*, L. K.
Administracio:
Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo
po numero egalvaloro de 0,06 dolaro aŭ 0,30 sv. fk. por landoj, kies valuto suferis maksimume 50%; por ĉiuj aliaj landoj 0,05 dol. aŭ 0.25 sv. fk.

Anoncprezo
po kvadrat-centimetro egalvaloro de 0.20 sv. fk. (ĉe antaŭa pago 0.15 sv. fk.), en „Internacia Komerco“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, Bucureŝti, Edinburg, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa.

La gravaj sukcesoj de Esperanto en la lasta tempo, la pliseriozigo de nia movado, la ĉiutage kreskanta intereso de oficialaj rondoj kaj de la cetera publiko por nia afero kaj la ofte esprimita deziro de nia legantaro decidigis nin iri pluan paŝon sur la vojo, kun ni skizis jam en nia unua cirkulero antaŭ apero de „Esperanto Triumfonta“ — la vojo al ĉiutaga ĵurnalo esperantista: Post la 1-a de decembro nunjara nia jurnalo aperos

dufoje en la semajno.

„Internacia Komerco“ kaj „Revuo“ estos kunfandataj kun „Esperanto Triumfonta“, kaj la kunfandita trio havos post novjaro 1925 la novan titolon

Heroldo de Esperanto.

Tiu titolo sonas al la ekstera publiko malpli fanfarone kaj pli serioze ol la ĝisnuna kaj tamen ne estas tiel seka kiel simpla „Ĵurnalo“, „Gazeto“ aŭ similaj titoloj. Nia ĵurnalo volas esti heroldo, kiu anoncas la novajn venkojn kaj triumfojn de Esperanto al la tutmonda gesamideanaro kaj al la cetera publiko.

Koncerne la novan aranĝon de l' abonado, prezoj de abonoj kaj reklamoj ktp. legu sur speciala **Tarifo** aldonita al la hodiaŭa numero. Por ĉiu abonanto de „Esperanto Triumfonta“ estas gravege, nepre legi ĉiujn tie donitajn informojn kaj klarigojn.

Ni esperas, ke la tuta esperantistaro ĝoje salutos la duonsemajnan aperadon de nia ĵurnalo kaj, pli ol ĝis nun, subtenos nin en nia komunutila entrepreno.

Samtempe ni informas, ke nia ĝisnuna administracia direktanto kaj redaktoro s-o Robert Kreuz, laŭ amika interkonsento, eksiĝis el nia entrepreno la 1-an de novembro, por dediĉi sin al alia interesosfero. Ni deziras al li bonan sukceson en lia nova agadkampo.

Eldonejo kaj Redakcio.

Esperantista Akademio.

Baloto de unu Akademiano por la rusa lingvo (Posteno 11).

Voĉdonintoj: 87
Voĉoj por s-o Medem, Kaunas (Kovno) 46 (Elektita)
„ „ „ Fiŝer (Fisher) Bucureŝti 40
Voĉdonilo sur kiu ambaŭ nomoj estis strekitaj 1/87

Du cirkuleroj, entenantaj voĉdonilojn, senditaj al la 2 jenaj LK-anoj: s-oj D-o B. Rácz (matrai utca 9, Budapest, Hungarujo) kaj L. Dreher (ĉe s-o Rapelski, Byalystok, Polujo), revenis kun la poŝta noto «Nekonata». Tiuj ĉi LK-anoj estas petataj konigi al la Prezidanto sian nunan adreson.

* * *

La Akademio konsistas do nun el:

Prof. Th. Cart, Prezidanto (Posteno 3); — s-oj L. M. Warden (P. 9), kaj D-o Dietterle (P. 5), Vic-Prezidantoj; — Prof. E. Grosjean-Maupin, Direktoro de la Sekcio «Komuna Vortaro» (P. 15); — D-o W. Lippmann, Direktoro de la Sekcio «Gramatiko» (P. 4); — D-o E. Privat, Direktoro de la Sekcio «Konkursoj kaj Premioj» (P. 2); — s-oj W. Bailey (P. 17), P. Christaller (P. 10), P. Corret (P. 18), A. Dombrowski (P. 16); V. Inglada (P. 14), J. R. G. Isbrücker (P. 1), E. Kühnl (P. 8), P. Lengyel (P. 13), P. Medem (P. 11), B. Migliorini (P. 6), E. A. Millidge (P. 12), P. Nylén (P. 7).

La estraro estas elektita en la jaro 1923 kaj estas rebalotota en 1926.

Postenoj rebalototaj:

En 1925: 7, 17, 1, 10, 6, 9; — en 1928: 13, 15, 18, 8, 2, 3; — en 1931: 5, 4, 14, 12, 16, 11.

Akademiaj Korespondantoj:

S-o Rollet de L'Isle (Scienca kaj Teknika Vortaro), s-o Setäla (Finna Lingvo), s-o M. Solá (Kataluna); s-o A. Tellini (Ladina), D-o Leono Zamenhof (Pola), s-o Everardo Backheuser (Portugala Lingvo).

Sekcioj:

Komuna Vortaro: Prof. Grosjean-Maupin, Direktoro; s-oj Bailey, Migliorini, Millidge, Nylén, Bünemann, Solá, membroj.

Gramatiko: D-o Lippmann, Direktoro; s-oj Christaller, Corret, Lengyel; Collinson, Stojan, membroj.

Konkursoj kaj Premioj: D-o Privat, Direktoro; s-oj Isbrücker, Kühnl; s-ino Hankel, s-oj de Ménil, Strœle, membroj.

* * *

Prof. Grosjean-Maupin ĵus fariĝis Direktoro de la ĉefa ŝtata Edukejo por junaj blinduloj (Directeur de l' Institution Nationale de Jeunes Aveugles), kaj lia nova adreso estas: 56, Boulevard des Invalides, Paris 7.

* * *

S-o Leopold Dreher, L. K., petas nin sciigi ke lia nuntempa adreso estas: Starowislna 37, Kraków (Polujo).

16-a Brita Kongreso de Esperanto.

La Brita Kongreso en 1925, kiel ni jam raportis antaŭe, okazos en Leamington-Spa en la mezlanda parto de Anglujo. La 16-a kongreso estas invitita kaj oficiale organizata de la Mezlanda Federacio de esperantistoj. Kvankam ankoraŭ multaj monatoj disiĝas la esperantistojn de la kongreso, ĝia organizo jam estas en sufiĉe progresinta stato. Oni jam elektis fortan Organizan Komitaton kun nia fervora samideano Cecil C. Goldsmith kiel organiza sekretario, kaj, ĉio konsiderite, ĝia sukceso estas antaŭdirita konkludo.

La allogo al tiu kongreso estas granda pro la interesa urbo, kaj la ĉirkaŭaĵo, la fame konata Shakespeare-a najbaraĵo de Leamington, certe altiros niajn britajn kaj eksterlandajn samideanojn al nia Deksesa. Ĉiuj povas kunigi plezuron kun laboro dum la belaj tagoj, kiujn la organizantoj penas jam nun aranĝi.

La kosto de la kongres-bileto estas 3.6 kaj por junuloj 1.6. La Hon. Sekr. petas jam nun ĉeestantojn sendi siajn kotizojn por la kongreso, kiujn oni povas adresi al C. C. Goldsmith, 31 Stafford Rd, Handsworth, Birmingham. *J. D. A.*

14-a Germana Esp. Kongreso 1925 en Magdeburg.

Unua ĝis tria komunikoj.

La esperantistaro de Magdeburg sin sentas honorata, ke ĝi havas okazon gastigi la venontan (XIV-an) Germanan Esperanto-Kongreson inter ĝiaj muroj. Fierante pri tiom da konfido, ĝi promesas al ĉiuj partoprenontoj bonan aranĝon. La proponita subteno flanke de la amikoj en Berlin, Potsdam kaj Plauen estas danke akceptata.

1. La kongreso okazos dum pentenkosto 1925 (31 majo ĝis 2 junio).
2. La loka kongresa komitato definitive konsistas el: s-o Alfred Fuhrmann, komercisto, prezidanto; s-o Julius Michaelis, komercisto, vic-prezidanto; f-lino Margarete Küster, sekretariino; s-o Eduard Michaelis, supera poŝtsekretario, kasisto; s-o Bernhard Wottrich, instruisto; f-lino Toni Simon; f-lino Margarete Schreiber.
3. Kelkaj eminentaj esperantistoj de la Berlina Gruparo, sufiĉe konata en Esperantujo, nome f-lino Hildegard Nickel, s-o Blankenheim, redaktoro Eilersiek, direktoro Glück k. a. kunlaboras, kaj tiu ĉi ŝatata de ni helpo estas garantio por la sukceso de la kongreso.
4. Supera urbestro Beims (Magdeburg) promesis protekti la kongreson kaj propagandi nian lingvon inter la membroj de magistrato
5. Ni elektis kiel kongresejon la „Wilhelma“.
6. Ni sendos aliĝilojn al grupestroj kaj petas ilin varbi por la kongreso dum ĉiuj kunvenoj, por ke la magdeburga kunsido estu multnombre vizitata de gesamideanoj el ĉiuj partoj de la patrolando. Estas rekomendinde tuj aranĝi ŝparkasojn por la magdeburgaj pentekostaj tagoj.
7. Ni intencas lui hotelojn, sed ni nur povas akcepti mendojn por loĝejoj, se estos pagata la luprezo sufiĉe frue antaŭe. Pri tio ni informos dum decembro.
8. Adreso por aliĝoj kaj skribaĵoj: Alfred Fuhrmann, Magdeburg, Friesenstr. 53, telefono 7772
9. Monon bonvolu sendi al: „Deutscher Esperanto-Kongress Magdeburg“, poŝtĉeka konto n-o 7878, Magdeburg.
10. Kotizo ĝis 1. 1. 1925: 5 mk. (por samfamilianoj 3 mk).
11. Aliĝiloj estos presataj. Post ilia forsendo aliĝu baldaŭ, ĉar ni bezonas monon, multe da mono. Tial ne ĝisatendu la aliĝilojn, sed sendu vian kotizon poŝtĉeke kiel eble plej baldaŭ.
12. Provizorajn kongreskartojn ricevos ĉiu, kiu aliĝis kaj sendis kotizon.

Alfred Fuhrmann.

10-a Itala Kongreso en Bari.

Itala Esp. Federacio ankaŭ en Bari.

Post la invito de la Esperanta-Balkana Akademio de Apulio, la kongreso de Torino elektis Bari por la 10-a Itala Kongreso de Esperanto. Ĝi elektis ankaŭ tiun ĉi urbon kiel sidejon de la Itala Esperanto Federacio, kies prezidantoj dum la jaro 1925 estos Prof. Lacalendola de la Komerca Universitato, prezidanto de la Esperanta Balkana Akademio de Apulio (por la dua sekcio) kaj Prof. Koch (por la unua sekcio). La kongreso okazos dum septembro 1925.

Konkordo.

(Sido en Warszawa, Dzika 9 loĝ. 10.)

Per Esperanto —
Al repaciĝo kaj konkordo.

Komuniko.

Post trijara vagado, dum kiu pro manko de loĝejo ni estis devigitaj malatenti kaj malzorgi pri niaj aferoj ekstervarsoviaj, ni fine trovis konstantan loĝejon. La adreso Dzika 9 loĝ. 10, ŝajnas nemalmemorebla al iu ajn esperantisto en la mondo. Ni petas tial ĉiujn, kiujn logas la ideo en nia devizo citita, la ideo pri fratiĝo de l' homaro, la fama Interna Ideo de Esperanto, komunikiĝi kun ni por kune formi unu efektive „grandan rondon familian“.

Ni ne venas al vi kun nova programo. Ununura estas nia celo: kunigi ĉiujn adeptojn de l' Interna Ideo, por kune ellaboradi laborplanojn kaj sistemojn.

Dum la XVI-a Kongreso de Esperanto en Vieno nia societo okazigis la unuan fakan kunsidon de „Konkordo“. (La raporton vidu en n-o 7 de l' kongresa bulteno, 13 aŭg. 1924), kiu kvankam ne estis multnombra, tamen evidentigis, ke idealistoj troviĝas en tuta mondo, ĉar alvenis samcelanoj el Germanujo, Ĉeĥoslovakujo kaj Jugoslavujo. Laŭ akceptita dum tiu ĉi kunveno rezolucio ni penos ofte komunikiĝadi kun niaj

samcelanoj pere de la esp. gazetaro. Gis kiam ni havos nian propran organon, ET bonvolis akcepti tiun ĉi taskon. Tial ni petas ĉiujn niajn membrojn kaj simpatiantojn atente legi tiun ĉi gazeton, ĉar en ĝi ni regule aperigados niajn komunikojn.

Dum la XVII-a Universala Kongreso de Esperanto en Ĝenevo ni okazigos la II-an internacian konferencon (ev. fakkunsidon) de l' „Interna Ideo"-adeptoj sub la nomo de „Konkordo".

Intertempe ni alvokas ĉiujn disigitajn samcelanojn kaj samidealajn grupojn al ofta kunlaboro. Nia unua deziro estus, ke ĉiu lando havu sian centrejon, kiu estos en konstantaj rilatoj kun la Varsovia centrejo.

La agado sur varsovia grundo dume limiĝas jene:

La 22 sept. ni okazigis nian unuan kunvenon kun raporto pri Vieno. La kunveno aprobis kaj la sintenon de l' sendito dum la XVI-a Universala Kongreso de Esperanto kaj la agadon dum la faka kunsido.

La 15 okt. ni okazigis propagandan referaton de s-o Bronstein: Esperanto kaj Radiotelefonio, dum kiu estis, interalie, priparolata la grava agado de la Internacia Radio Asocio k. a.

La 17 nov. okazos referato de f-lino Lili Zamenhof: Esperanto kaj Kinematografio.

La 15 dec. ni aranĝos en Varsovio en nia konstanta sidejo, Dzika 9, en la ĉambro, kie eble ankoraŭ ĝis nun ŝvebas la spirito de nia Majstro, solenan 65-an datrevenon de l' naskiĝo de tiu geniulo. Saluttelegramoj kaj leteroj estos kore vidataj.

Sed detaloj pri tio venos en la novembra komuniko.

La Estraro.

Varsovio, 15 okt. 1924.

Esperantista Sporto.

Esp. Piedpilka Klubo „Pobeda" en Rusĉuk (Bulg.)

sendis al ni raporton pri sia agado en sferoj de sporto kaj de societa vivo.

La klubo estas fondita la 10 sept. 1922. La nomo „Pobeda" signifas „Venko", kaj la klubo ĉiam klopodas sur la ludejo venki. La organizo estas bona, regas firma disciplino. En pasinta printempa sezono ĝi estas gradigita je 5-a rango.

La klubo konatiĝis kun Esperanto en vintro 1923, kurson gvidis s-o Ivan Kovaĉev. Dank' al liaj klopodoj la klubo hodiaŭ leviĝis super aliaj, ĉar ĝi estas internacia kaj precipe dum la II-a Bulgara Esp. Kongreso en Rusĉuk bone propagandis por Esperanto, montrante al la sportistaro kaj urbanaro, ke Esperanto estas taŭga rimedo por facile interkompreni kun eksterlanduloj. Nian II-an kongreson partoprenis ankaŭ samideanoj el Rumanujo s-oj D-o Fiŝer, pastro Ĉe, Tiberiu Morariu kaj hina Prof. Won Kenn de Lyona Universitato.

La kongreso komenciĝis la 27 julio; saman tagon alvenis sportista klubo „Esperanto" el rumana ĉefurbo Bucureŝti. La 30 julio okazis sur ludejo „Alej" (Aleoj) internacia pilkludo en ĉeesto de multaj sportistoj, urbanoj kaj kongresanoj. La rumanaj sportamikoj estis tre kontentaj pro la bona interkompreno.

La 7 sept. nia klubo inaŭguris sian unuan standardon en katedralo „Sveta Troica" (Sankta Triunuo) en ĉeesto de honorgastoj kaj de sportista trupo „Vultur" el Bucureŝti. La ceremonion gvidis la episkopo. Granda manifestacio sur la ĉefstratoj kun akompano de militista muziko. Samtage okazintan internacian ludon gajnis „Pobeda" (4 : 3).

Ni esperas, ke ni havos ankoraŭ ofte okazon vidi eksterlandajn sportistojn en nia urbo kaj konkuri kun ili en paca konsento.

D. I.

Aktuala politiko.

Rimarko al la artikolo „Paneŭropo" en ET n-o 214.

Aludante al la artikolo de P. Glöckner (Pirna) mi permesas al mi jenajn informojn: Leginte la gravege interesan verkon de la eminenta pioniro por pacifismo D-o R. Coudenhove-Kalergi, mi tuj skribis al li, atentigante lin pri Esperanto kiel plej taŭga interkomprenilo por diverslingvanoj kaj kiel bona helpilo por la paneŭropa problemo. D-o Condenhove estis afabla tuj respondi al mi, kaj skribis la sekvantan leteron, datitan de 31 jan. 1924:

„Tre estimata sinjoro doktoro!

Multan dankon por via interesa letero pri Paneŭropo kaj Esperanto.

La angla linvo kiel internacia lingvo por interkompreniĝo entute ne estas absolute necesa apartaĵo de la paneŭropa programo. Laŭ ĉi tiu vidpunkto estas por mi indiferente, se anstataŭ ĉi tiu lingvo fariĝas la franca lingvo aŭ Esperanto la lingvo por interkompreniĝo. La ĉefa afero estas, ke la eŭropanoj povu interkompreniĝi — kiamaniere ili tion faros, tio estas flanka afero. Paneŭropo estas ankaŭ ebla, se la eŭropaj popoloj ne interkonsentiĝos pri unu komuna lingvo, kaj iliaj kongresoj bezonos la „apogbastonojn" de interpretoj; ekzemploj por tio estas Svisujo, la Panamerika unuiĝo kaj la Ligo de Nacioj.

Internacia lingvo estus tamen grava progreso en la homara unuiĝ-movado, kiun ĉiu pacifisto devus sincere saluti: pro tio mi sentas la plej grandan simpation por la Esperanto movado — kvankam mi ne povas malkonfesi, ke mi konsideras la anglan lingvon kiel pli esperplenan kandidaton por la estonta mondlingvo.

(Subskribo.)"

Intertempe mi ricevis de D-o C. la permeson, esperantigi lian broŝuron „La Pan-Eŭropa Manifesto", kiu jam aperis okaze de la XVI-a kongreso, kaj ankaŭ mi tradukos interkonsente kun la aŭtoro lian ĉefverkon „Pan-Eŭropo", kiam por ties eldono troviĝos eldonisto.

En ĵus aperinta broŝuro „Pazifismus" skribas D-o C.:

Esenca tasko de pacifismo estas la enkonduko de internacia interkompreniĝlingvo.

Kiel internacia lingvo por interkomunikado estas konsidereblaj sole Esperanto kaj la angla. Kiu el ĉi tiuj du lingvoj estos elektata por la internacia trafiko, tio estas indiferenta apud la postulo, ke la mondo interkonsentu pri unu de ĉi tiuj lingvoj.

D-o Edmund Sös, Wien.

Komerco.

Libera urbo Danzig.

Dank' al nia senlaca pioniro s-o Aeltermann, prezidanto de la Danziga Esperanto Asocio, la estraro de la II-a Danziga Internacia Foiro (2—5 oktobro 24) decidis uzi ankaŭ Esperanton, presigante 10 000 propagandilojn en Esperanto.

La foira estraro krome disponigis senpage al la Danziga Esp. Asocio vastan ejon (45 m²) en la domo „Oliva", kie la foiro havis sian ĉefan sidejon. La esperantistoj aranĝis grandan ekspozicion, ornamitan tre plaĉe per diverslandaj flagoj, presigis 8 000 flugfoliojn, kiuj invitis la foirvizitantojn rigardi la esp. ekspozicion. La grandega verda stelo antaŭ la domo jam de malproksime estis videbla. Pli ol 20 000 personoj vizitis la ekspozicion, inter ili multaj eksterlandaj esperantistoj el Polujo kaj Germanujo.

La sukceso, kiun ni atingis ĉe la Danziga Internacia Foiro, estas tre grava. La foira estraro presigis la foiran libron en germana kaj pola lingvoj kaj — en Esperanto. Sekvante la ekzemplon de aliaj foiroj la foira estraro intencas aranĝi daŭran Esperanto-fakon. La esperantistoj en Danzig kore petas ĉiujn eksterlandajn esp. komercistojn interesiĝi pri la Danzigaj Internaciaj Foiroj per skribaĵoj en lingvo Esperanto.

La gazetaro menciis favore nian ekspozicion. „Danziger Zeitung" aperigas regulajn Esperanto-angulojn kaj enpresis eĉ esp. tekston okaze de la foiro. La situacio ĝenerala estas favora por ni. Neniu kuraĝis protesti aŭ kritiki la trilingvan eldonon de la foira libro. Diversaj lokaj firmaoj pendigis siajn afiŝojn en esp. lingvo en nia ekspozicia ĉambro kaj aldonis eĉ en Esperanto propagandilojn.

Ankaŭ la grupa vivo de la Danziga Esperanto Asocio plivigliĝas. Regule dum ĉiu semajno okazas kunveno kun interesa programo. Regulaj paroladoj kaj referatoj en Esperanto (estonte eĉ kun lumbildoj). En kadro de Popola Universitato du kursoj komenca kaj perfektiga. En polica lernejo unu kurso. En Danzig ni staras nun en periodo de sukcesoj. Nun venis la tempo komenci spritan kaj saĝan laboron por praktike eluzi ĉi tiujn sukcesojn.

J. F.

23-a Mond-Pac-Kongreso

La 23-a Mond-Pac-Kongreso okazis en Berlin de 2—8 oktobro 1924 sub la prezido de Senatoro La Fontaine, Nobel-premiulo, kaj de Prof. Quidde. Tiu ĉi kongreso en ĉiu rilato povas esti rigardata kiel granda manifestacio por la mondpacideo, kaj oni gratulu al la kongres-komitato pro tiu ĉi efikplena kaj inda aranĝo. Neforgesebla restos la solena malferma kunsido en Reichstag, en formo de pacifista funebra soleno. La paroladoj de Senatoro La Fontaine-Belgujo, Senatoro Buisson-Francujo (84 jara), s-ino Pethick-Lawrence-Anglujo, Paul Löbe, prezidinto de la germana Reichstag, Fritjof Nansen, la fama nordlandano, esprimis la profundan deziron al la vera mondpaco kaj la nepra evito de estonta milito.

Vespere okazis en la salonoj de la Palaco Friedrich Leopold granda akcepto de la kongresanoj, dum kiu inter la multaj aliaj ankaŭ la reprezentanto de U. E. P. L. kaj de la esperantistaro Direktoro Glück, laŭ invito de la prezidanto Quidde, havis okazon diri kelkajn esperantajn parolojn al la ĉeestintaro. — Proksimume 12 esperantistoj estis inter la gastoj, inter ili D-o Kliemke kaj s-o van Etten, franca samideano kaj delegito de la francaj kvakeroj.

Kiu scias?!

(Quien sabe!)

Skizo pri la meksika karaktero.

En la kamparo:

Bonon donu al vi la Dio, kunpatreto; kion vi pensas, ĉu la maizo maturiĝos bone?

La indiĝeno elmetas sian grandan ĉapelon, esploras la kvar ĉefajn direktojn kaj diras:

Kiu scias?!

En la urbo:

La Sinjoro helpu nin! kio ŝajnas al vi niaj politikaj aferoj; ĉu ni havos novan revolucion?

La maljunuleto etendas sian malsupran lipon, levas la ŝultrojn kaj respondas ekĝemante:

Kiu scias?!

Rimarkas la eksterlanduloj nian tiufrazan trouzadon. Iaj usonanoj ĝin lernas sentraduke (pro neebleco, ili diras) kaj ĝin uzas por priparoli la enigmajn meksikaĵojn.

Foje diris al mi klera germano ke li, studante hispanan lingvon, penis, dum babilado, klarigi la mistersencon de tia vortparo. Ĉu li sukcesos? Eble lia tuta eŭropa scienco frakasiĝos kontraŭ la komplika enlanda psikologio. Se ni, samhejmanoj, scivolemaj interesuloj malsukcesas, kompreneble aliaj same malsukcesas.

Lernigas nin biologio, ke ĉiu estaĵo historie estas la speco, kiun reprezentas la nuntempulo. Ke se ni demandas iun ajn semon, ĝi rakontas al ni kiamaniere germadis ĝiaj antaŭuloj, burĝonadis, kreskadis la facilrompa arbetaĵo, ĝia foliformo, koloro, branĉetara fibro; poste kiajn florojn kun aparta odoro ĝi havis, fine la frukton; kaj, ene, denove, ĝia historio! Mirinde!

Ĉu ĉiu el ni, memoro kiel kreskaĵoj, kompendias homan historion?

Antropologiisto kunportas nin milionjaron malantaŭen, kiam la vivo elakve eketendiĝis tra la marbordaro. Ĝi rakontas pri ihtiosaŭroj, mamutoj, mastodonoj kaj aliaj fantaziinomaj bestoj.

Ĝi diras al ni ke, observante la homembrian disvolvon, ni ricevas korpreman impresserion: la eta vivo ŝajnas unue molusko, fiŝo, batrako, rampulo; poste, palmipiedo; nun la pupeto kovriĝas per delikata lanugo, ŝajne kreskigos voston. Post fina malapero de tiom da minacaj signoj, el tiaspeca fandpoto eliras: Reĝo de kreitaĵaro.

Cerbumante pri ĉio-ĉi, ni pensas je inkubo. Ĉu ŝerce aŭ vere ni estas parencaj kun pelikano aŭ ezoko? Rememorante pri vosteto kaj darwina teorio, ni indiĝiĝas je la supozo ke niaj onkloj estu povintaj flugi sur la branĉoj.

Sed nia dua „ego", ĉiam kontraŭstaranta, rememorigas al ni tiom da simiagoj niaj; estingigitaj ĉiuj protestoj, doloriĝitaj ni elspiras:

Kiu scias?!

Kio estas la meksikano? Azteko, tolteko, otomio, nahuo, manĉuo? Tien iras la imago, trakuras Amerikon, krozas la Pacifikon sekvante Koreon, Mongolion aŭ Hindujon, sin servante, kvazaŭ de gvidiloj, de postsignoj lasitaj en nia karaktero de budisla kvietismo, de tatara migremeco kaj de semida avareco.

Kion faris la meksikano antaŭ la hispana invado? Ĉasadis, militadis, adoradis la stelojn, buĉadis siajn simiulojn ilin mangante ĉe solenaj okazoj. Tiam, la eŭropano jam de longe estis lasinta kanibalismon trovinte pli taŭge ke la venkito laboradu por li. Same ankaŭ agis azteko por siaj mastroj, murdadis aŭ mortis pro ili, starigadis piramidojn kaj grandiozajn palacojn.

Alvenas la konkeranto, demandas oron: la enlandulo plenigas lian kaskon; farrabas liberecon kaj landon: nur malforta defendo. La indiĝeno ne faris plu piramidojn, sed preĝejojn, kaj anstataŭ malbelegaj idoloj li adoradis de nun bildojn de kristansanktuloj.

Quetzalcoatl-an krucon anstataŭis la Jesua. Malnovaj mastroj nomis lin „tameme", la novaj „indjo". Li akceptas ĉiujn ŝanĝojn indiferenta. Ĉio estas same! li pensas.

Forpasas jarcentoj; estas nova raso, kiu sin sentante sufiĉe forta ekskuas la eŭropan jugon, nesatigeblan Danaidan barelegon, kiu jam ne demandas oron en kasko kiel Cortez-aj kunuloj, sed en senfina ŝipvico. Kaj la „tameme" kunhelpas dispecigi tiujn ĉenojn.

Nun li ne konstruas piramidegojn nek belegajn katedralojn. Antaŭ jarcento, respekteginda blankhaŭta, blu-okula maljunulo diris lin, ke li jam estas libera. Li travagadas montojn aŭ valojn senmalhelpe. — Ĉi estas ja libera! — oni ripetas al li.

Ĉu li rehavis sian landon? Ne, tion havas ankoraŭ la blankulido, kiu sin vestas per lano aŭ silko, dum la indjo uzas kotontolajon kaj „huarache" (ledaj senkovrila ŝuo). La mestizo, kiu loĝas en komforta domo, dum la indjo dormadas sur junkmato ĉe fumanta pajidomeio. La urba indjo, kiu sin vestas eŭropofasone, imitas malvirtojn de civilizito kaj sin kredas supera al siaj fratoj.

La meksika indjo ne protestas, ne organizas pasivajn rezistadojn kiel lia hinda kolego. Li ne revoluciadas, kvankam oni puŝas lin al tio. Memenfermite li vidas ĉion kaj ĉiujn malestime kaj travivas tristan monotonan vivon, rifuzante partopreni en la nia. Nur dolorkantoj perfidas foje la bronzrasan hermetismon.

Fatalismon kaj skeptikecon liajn havas ni meksikanoj ĝenerale. Pro tio, kiam germano aŭ usonano kredas, ke per artikolo aŭ libro ili difinos nian konfuzegan psikologion, ni sentiĝas „indios" senmiksaj, kaj, ridetante laŭ ilia maniero, ni ekscitas la fremdulojn per la taŭga frazo:

Kiu scias?!

Jesus Amaya, Mexico D.F.

* * *

Tra nordorienta Eŭropo.

1. Karelaj popolmoroj.

Kultura skizo de *Ernest Hediger*, latva legaciano, Roma.

En la granda fina popolfamilio, la kareloj, la orientaj najbaroj de la finlandanoj, estas certe unu el la malpli konataj membroj. Tio estas dès pli bedaŭrinde, kiam oni konscias, ke ili reprezentas popolon tre interesantan, kies moroj kaj kutimoj precipe estas tre riĉaj kaj originalaj.

Oni scias ke la plej granda parto de Karelio troviĝas ankoraŭ sub la regado de Ruslando. Kiam la paco estis farata inter Ruslando kaj Finlando, en oktobro 1920, la packontrakto inter tiuj du landoj antaŭvidis memregadon de Karelio, kun federigo al soveta Ruslando. Sed ĝis nun la karelianoj malfeliĉe ankoraŭ ne vidis tiun memregadon efektiviĝi.

Kvankam sub rusa regado, la karela popolo konservis civilizon tre malsaman al tiu de la slavoj. Ili estas dolĉaj, honestaj kaj posedas je alta grado la senton de la familio. Tre poeziemaj — la fama fina lirika epopeo „Kalevala" naskiĝis ĉe ili —, iliaj moroj hodiaŭ ankoraŭ fidele reflektas la malnovegajn kutimojn de ilia lando. La karela folklora materialo estas tiel riĉa ke ni ne povas priskribi eĉ nur la ĉefajn kutimojn; ni devos kontentiĝi kun la priskribo de karela edziĝofesto, kiu per sia riĉeco je interesaj detaloj donos tamen klaran ideon pri la moroj de tiu malfeliĉa popolo.

Kiam la karela junulo trovis fraŭlinon siagustan, kiun li deziras edziĝi, kaj posedas la aprobon de siaj gepatroj, li decidas unu tagon fari la demandon edziĝan al la gepatroj de la fraŭlino. Kune kun kelkaj amikoj, li iras al la domo de la estonta fianĉino kaj dumvoje pafas en la aeron por sciigi al la vilaĝanoj ke li iras serĉi al si „lanan koltukon", t. e. virinon.

Akceptite de la gepatroj, li submetas sian demandon. La patro de la junulino tiam kunvokas la tutan familianaron, kiu priparolas la demandon kaj ĝin rifuzas aŭ akceptas. En la lasta okazo, la patro ekbruligas kandelon antaŭ la ikono de la familia sanktulo kaj solene demandas

La laborkunsidoj ĉefe pritraktis la demandon pri la universala malarmo kaj Pan-Eŭropo kaj la Ligo de Nacioj. Pri la lasta temo interese parolis D-o Coudenhove-Kalergi, kaj certe oni baldaŭ legos pli detale pri tiu ĉi jam nun mondpolitika temo en la esperantaj gazetoj.

Krom la ĝeneralaj okaziĝis laborkunvenoj de la diversaj komisionoj, al kiuj oni ankaŭ prezentis proponojn pri la uzado de Esperanto en la lernejoj kaj kiel estonta kongreslingvo por la packongreso kaj la tuta porpaca movado. Al la komisiono B (demandoj de la Ligo de Nacioj) D-o Pohl-Berlin (Ligo de militservo-kontraŭuloj) faris la proponon pri subteno de la enkonduko de Esperanto kiel helplingvo. Same la komisionoj E (edukado kaj instruado) kaj F (propagando) ricevis proponojn de la „Universala Esperantista Pacifista Ligo" rilate al akcepto de Esperanto. La tuta kongreso poste decidis pri la en unu kunigitaj proponoj tiumaniere, ke oni rekomendu kiel praktikan helpon por la internaciaj interrilatoj la enkondukon de internacia helplingvo.

Ni ne preterlasu mencii, ke ankaŭ dum la packongreso la idistoj faris viglan kontraŭpropagandon. La propono de la komisiono F (propagando), en kiu jam la nomo Esperanto estis akceptita, estis antaŭ la tuta kongreso kontraŭbatalata de Gaston Moch (vicprezidanto de la kongreso!), kiu oficiale deklaris, ke Esperanto estas absolute finita afero kaj ke la kongreso sin kompromitus per la akcepto de Esperanto. Kontraŭ tiu ĉi oficiala kulpigo la oficiala delegito de U. E. P. L. kaj de G. E. A. Direktoro Glück tuj energie faris skriban proteston al la kongreskomitato kaj al la internacia konsilejo.

Ankaŭ tiu ĉi internacia kongreso per la lingva ĥaoso kaj la tempoperdoj pro la ripetadoj kaj tradukoj en tri diversajn lingvojn denove montris la nepran bezonon de la oficiala enkonduko de Esperanto.

La raportintoj:
Direktoro J. Glück, Berlin,
Hildegard Nickel, Potsdam.

Lernejoreformo.

Raporto pri la „Internacia Historio-Kunveno" aranĝita de la Ligo de decidaj lernejoreformanoj.

La ligo de la decidaj lernejoreformanoj aranĝis en Berlin de 2—4 oktobro 1924 internacian historio-kunvenon, kiu speciale pritraktis la transformiĝon de pedagogio, sociologio kaj historio-instruado en la lernejoj. Ĉeestis multaj en- kaj eksterlandaj gastoj, inter ili angloj, francoj, hindoj, ĥinoj ktp. — La prezidanto de l' kongreso, Prof. D-o Oestreich, deklaris en sia malferma parolo, ke tiu ĉi kongreso sin metos en la servon de la unuigado de la popoloj. El la multaj bonegaj paroladintoj ni citu speciale D-on Honigsheim-Köln, Prof. Strecker-Darmstadt, Prof. Kaweraŭ-Berlin, la ĥinon D-on Abdullah Jusuf Ali, Prof. Thivet-Paris ktp. Speciale interesa por la Esperanto-movado estis la referato de D-o Tacke-Stettin pri la studado de fremdaj lingvoj en la lernejoj, en kiu li ankaŭ menciis Esperanton kaj rekomendis la envicigon de tiu ĉi helplingvo en la programon de ĉiuj lernejoj post la forigo de la lingvo-dogmo.

Kiel reprezentantoj de la esperantistoj inter aliaj ĉeestis studkonsilisto Bonte-Frankfurt a. M., Direktoro Glück, f-lino Nickel, instruisto von Waldowsky-Berlin. Kelkaj el ili diris oficiale kelkajn vortojn pri Esperanto, sed ankaŭ idisto tre fervore batalis por sia sistemo.

En la ferma parolo Prof. Oestreich speciale menciis la signifon de mondlingvo, ĉu Esperanto ĉu Ido, decidon pri la sistemo li lasu al la praktiko.

Glück-Nickel.

la junulinon konigi ŝian opinion. Se ŝi estingas la lumon, ŝi montras per tio ke ŝi ne volas la proponitan fianĉon; se ŝi kontraŭe lasas la kandelon bruli, ŝi tiamaniere akceptas lin. La fianĉiĝo estas decidata kaj de tiu momento la junulino estas promesata al la junulo. Dum la viroj kantas siajn ritmoplenajn poeziojn, la virinoj ĉirkaŭigas la novan fianĉinon laŭte „plorante", t. e. kantante la malgajan kanton de la fianĉiĝo.

La edziĝo okazas iom poste, plejofte je sabato. La junulino devas antaŭe fari banon, kiu estas simbolo de ŝia pureco antaŭ la edziĝo. Dum la bano la knabinoj de la najbaraj domoj kantas malnovan poeziopleman plorkanton. Post tiu ceremonio, oni alportas al la baldaŭa edzino la donacojn de la fianĉo kaj de la parencoj.

Iom pli malfrue, patoj anoncas la alvenon de la fianĉo, kiu serĉas la amatinon por ŝin konduki al sia gepatra domo. Alveninte, ĉiuj sidas en la granda ĉambro de la ligna domo por la solena manĝo. Post tiu manĝo, dum kiu la virinoj ĉiam „ploras", la baptopatro aŭ la frato de la fianĉino iras serĉi la festajn vestaĵojn por la nova edzino. Sur ŝiajn ordinarajn vestaĵojn, li metas al ŝi la edziĝan ĉemizon, la edziĝan robon kaj la edziĝan bluzon.

Sed baldaŭ alvenos la momento de la preĝeja edziĝo, kaj la fianĉino devas sin vesti. Forlasante la ĉambron komunan kun siaj amikinoj, ŝi iras en ĉambreton, kie ŝi estas vestata kaj kombata de la najbarinoj. Tiel beligite, ŝi revenas en la grandan ĉambron. La fianĉo prenas ŝin je la brako kaj kondukas ŝin al la preĝejo. Antaŭ ol eniri la sanktan lokon, li prenas el sia poŝo koltukon, kies ekstreman parton li donas al la fianĉino, tenante mem la alian finon. Tiel kondukante ŝin, li eniras la preĝejon

Post la ceremonio, ĉiuj ĉeestantoj iras festi la edziĝon en la domo de la nova edzo. Dum la manĝado kaj la trinkado oni faras ĉiuspecajn ceremoniojn, kiuj devas altiri la bonŝancon por la nova familio. Ĉe la fino oni forprenas al la edzino la fruntan rubandon, signon de fraŭleco, kaj el ŝia hararo faras du plektaĵojn, signo de edzeco. Kaj poste ankoraŭ . . . sed estas neeble daŭrigi la priskribon de la ĉiuspecaj ceremonioj, kiuj okazas ankoraŭ dum tiu sola festo. Tutan libron ni bezonus por tio, ĉar en ĉiu vilaĝo ekzistas iom diversaj kutimoj. Laŭ la materiala situacio de la novaj edzoj la edziĝo estas pli aŭ malpli riĉa je kutimoj kaj samtempe kreskas la kvanto de la manĝaĵoj malaperigataj de la ĉeestantoj . . . hodiaŭ, bedaŭrinde, suferantaj je malsato, la malfeliĉaj karelianoj certe ne plu festas la edziĝon kiel antaŭe, sed tio estas certa, ke malgraŭ la suferoj ilia poezia animo neniam malaperos . . . .

Scienco.

Arkeologio.

La elfositaĵoj de la „Germana Orient-Societo" en El-Amarna.

Kiel en la lastaj jaroj la elfositaĵoj en Epiptujo mirigis la mondon, tiel ankaŭ en estintaj tempoj novaj trovitaĵoj atentigis la klerulojn pri la arkeologia laboro en Egiptujo. Antaŭ preskaŭ 40 jaroj oni trovis en El-Amarna la korespondaĵon, kiun interŝanĝis la egipta reĝo kun siaj vasaloj kaj malpli potencaj princoj en Antaŭa Azio. Ni ekscis per ĝi, ke en la mezo de la dua antaŭkrista jarmilo la forta egipta influo en Palestino kaj Sirio estis malpliiĝinta. Fremdaj popoloj estis enirintaj la teritorion de la malnovaj regnoj kaj la egipta ŝtato nur malmulte povis helpi siajn amikojn. Unu kaŭzo por ĉi tiu influ-malpliiĝo de la egipta potenco, iam tiel forta, kuŝas en tio, ke en tiuj jarcentoj sur la egipta trono sidis reĝo, kiu pasigis la tempon per utopiaj ideoj kaj spekulacioj sed ne atentis la ŝtataĵn interesojn Amenophis IV-a volis anstataŭi la malnovan landan religion per natur-religio, kiu anstataŭ la malnovaj diuloj konis nur la sunon kaj per tio je la unua fojo prezentas al ni monoteisman religion. Por eviti la propralandan kontraŭstaron, li kun sia tuta korteganaro forlasis la malnovan ĉefurbon Theben kaj fondis en Mez-Egiptujo novan urbon, nomatan El-Amarna, en kiu li kun siaj fideluloj adoris la sun-dion. Post lia morto lia reformo malprosperis; la konservativuloj venkis, kaj oni forgesis la nomon Amenophis IV-a kaj lian religion. Lian urbon oni detruis kaj kiel malfaman lokon oni evitis ĝin de tiutempe. Nur la novaj arkeologiaj laboroj en la pasinta jarcento konigis, ke tia reform-periodo regis eĉ en tradici-forta Egiptujo. La plej gravaj laboroj ĉe la elfosado en El-Amarna estas faritaj dum la lastaj antaŭmilitaj jaroj de la „Germana Orient-Societo" sub la gvidado de Ludwig Borchardt. Nekonata mondo estiĝis ĉi tie antaŭ niaj okuloj. Ne nur en la religio estigis novan la herezula reĝo, sed ankaŭ la arto de El-Amarna grave diferencas de tio, kion ni ĝis nun konas el malnova Egiptujo. En arto kaj religio li trovis la rektan vojon al la naturo; kiel la suno estas lia Dio, tiel li ankaŭ en la verkoj de siaj artistoj celas intiman aliĝon al la naturo. Ne plu la ceremonia digno, kiun ni vidas ĉe la pli malnovaj verkoj, karakterizas la bildojn de El-Amarna; sed viveco, kiu aspektas konata al moderna rigardanto. La egipta muzeo en Berlin enhavas multe da plastikoj, elfositaj de Borchardt. La germanaj elfosintoj sukcesis, malkovri inter la multaj dom-ruinoj de la urbo unu, kies posedanto estis Thutmoses, la plej eminenta skulptisto ĉe la reĝa kortego. En lia laborejo oni trovis multe da finfaritaj verkoj, sed ankaŭ nefinitajn laboraĵojn kaj skizojn; i. a. gipsmodelojn de kapoj. La valoro de la El-Amarna elfositaĵoj unuavice konsistas en tio, ke ili konigis al ni la artan kaj religian enhavon de la reformo. Kulturhistorie antaŭ ĉio estas interese, ke ni vidas ĉi tie reestiĝi antaŭ niaj okuloj malnov-egiptan urbon. La karaktero de la egipta klimato permesas, ke eĉ malfortikaj argil-konstruaĵoj transdaŭras jarcentojn kaj jarmilojn. Sed, ĉar Egiptujo ne nur dum antikva tempo sed ankaŭ dum la tuta mezepoko ĝis en nia tempo estis dense loĝita lando, en kiu unu kultur-epoko sekvis la alian, oni oftfoje detruis monumentojn el la pasinteco, uzis ilin por novaj konstruaĵoj, kaj tiuloke, kie en antikva tempo jam troviĝis homoj, denove ekloĝis homoj, kaj tiel malaperis la restaĵoj de la iama urbo. Nur la urbon El-Amarna oni evitis, kiel dirite, deposf la tempo de Amenophis IV-a. La sablo kovris la ruinojn kaj tiel konservadis ilin kiel dokumentojn pri mallonga epoko de la longa egipta historio. Rilate al la ankoraŭ freŝdata malkovro de la tombo de Tutanchamon estas interese, ke li estas la bofilo de Amenophis IV-a, kiu jam superis ties ideojn kaj retrovis la vojon al la malnov-egipta religio. En lia regad-tempo okazis tiu dua ŝanĝo kaj oni supozis, ricevi pri ĝi klarigojn. Bedaŭrinde oni ne trovis tiajn, ĉar neniun historian sciigon oni ĝis nun ricevis el la tombo. Ni esperu, ke la venontaj laboroj donu al ni klarigojn ankaŭ tiurilate.

Heino Heitmüller, Bremen 9,
Waller-Heerstr. 134
(Germanlando).

Svedaj esperantistoj salutas s-on Nitti.

S-o Francesco Nitti, la fama eksa ĉefministro de Italujo, turistis Svedujon. Invitite de la studentaro en Stockholm kaj en Upsala li paroladis (en S. 23. 10., en U. 24. 10.) pri „la neceso de la paco". Dum lia restado en la sveda ĉefurbo lin vizitis, la 22 okt., reprezentantoj de la esperantistaro, nome s-o Paul Nylén, prezidanto de la Sveda Esperanto-Federacio kaj de la Societo Stockholm, D-o Sam Jansson, direktoro de la liceo Beskow, kaj s-ino Irmgard Reinhardt, instruistino de unu el la reĝaj principidinoj. Salutante s-on Nitti en la nomo de la svedaj kaj speciale la stockholmaj esperantistoj, ili buŝe kaj skribe — en Esperanto kaj itala lingvo — prezentis al li sian respektegon, interalie per la jenaj vortoj: „Ni estas ĝojaj kaj dankemaj povinte legi en Esperanto vian faman verkon »Eŭropo ĉe la abismo«, per kiu vi klarigas vian libereme virecan opinion pri la brule aktualaj demandoj politikaj de nia mizera Eŭropo, turmentata kaj disŝirita per la milito kaj malamo. La noblaj sentimentoj tie esprimitaj certe faras eĥon ankaŭ en niaj koroj. Sed ankoraŭ pli ni estas feliĉaj kaj dankemaj al via moŝto, ĉar vi en la antaŭparolo de la dirita eldono esperanta esprimis vian plenan aprobon de nia laboro por Esperanto, asertinte vian »esperon, ke ĝi rapide fariĝos la plej granda helpilo por la unuigo de la popoloj«."

S-o Nitti tre aminde akceptis la deputitaron kaj interparolis kun ili dum duonhoro, ankoraŭ substrekante la gravecon de Esperanto kaj Esperantismo por la paco kaj la amikemaj interrilatoj de la nacioj.

Stockholmano.

Radio.

Represo en nacilingvaj radio-gazetoj nepre rekomendata!

Germanujo.

Radio-Disaŭdigo de Königswusterhausen Esperanto-Koncerto.

Dimanĉon, 16 nov., antaŭtagmeze okazos Radio-disaŭdigoj de la stacio Königswusterhausen apud Berlin: inter 10.40—11.40 h. sur ondo 680 (Germanujo) propaganda parolado (germanlingve) pri Esperanto de telegraf-direktoro A Behrendt; inter 11.40—12.40 h. sur ondo 2800 (eksterlando) Esperanto kantad-prezentadoj (Solo- kaj Kvartetkantoj). Detaloj pri la programo sekvos. Ĉiuj, kiuj aŭskultos tiujn prezentadojn, estas petataj sendi sciigon pri tio al „Esperanto Gruparo Berlin", Geschäftsstelle Berlin SW. 61, Wilmsstr. 5.

H. Nickel.

La Hamburga Radiostacio.

Ĉiuj ĵurnaloj publikigis eraraĵn detalojn pri la esperantlingva disaŭdigo ĉe la Hamburga Radiostacio. La ondolongeco estas 389, la tago de la disaŭdigo merkredo, kaj la horo ne estas ĉiam la sama. La ekzakta horo de la venontsemajna disaŭdigo estos ĉiufoje tradirata, sed ne estas eble, publikigi iun daton kun la ekzakta horo en ET, ĉar por tio devus esti eble, scii la horon jam du semajnojn antaŭe. Ni tial rekomendas al la geaŭskultantoj, ke ili unufoje mendu la ĵurnalon de la hamburga stacio, kiu elvenas ĉiuvendrede, kaj tial povas esti en la manoj de la interesatoj antaŭ merkredo. Tiu ĵurnalo — „Die Norag" — estas mendebla ĉie; la adreso de la redakcio estas „Norag", Hamburg (Germ.), Artushof, Gr. Bleichen. Per ĝi oni povas ekscii la horon de la disaŭdigo en la semajno de la ricevo kaj estos informata per aŭdado pri la venonta fojo.

M.

Svedujo.

La radio-gazeto „Radio-Bladet" petis de la sekretario de la Sveda Esperanto Federacio artikolojn pri Esperanto. La redaktoro de al gazeto provis okazigi Esperantokurson per radio, sed pro certaj kaŭzoj tio ne povis okazi. Li daŭre sin interesas por la afero kaj en ĉiu numero enpresas notojn kaj artikolon pri nia lingvo rilate al radio. La adreso estas Brunkebergstorg 15, Stockholm.

Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciigojn (sur poŝtkarto aŭ aparte folieto anuflanke skribita, sed ne inter administraj aŭ privataj sciigo) pri ĉiu novaĵo el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legebie (precipe nomoj).

Raportojn sendu ĉiam tuj! Alie ili estas por ni senvaloraj, kaj ni ne povas publikigi ilin!

Ameriko.

Usono.

Boston. Ĉe kunveno de Bostona Societo ĉe ges-oj Maluf en Arlington, Mass., la 27 sept. estas anoncita la programo por la vintra agado. Multe da intereso ĉe radiorondoj. Klubo kunvenas ĉiumarde vespere por komuna manĝo kaj babilado, poste al klubĉambro por studado k. a. La gazetaro favoras iomete per oftaj aludoj sed ne per artikoloj.

Azio.

Siberio.

Ĉita. (Estas unu el la plej grandaj urboj de Oriento Siberio kun ĉ. 80 000 loĝantoj.) Nia movado progresas. En lokaj gazetoj „Laborista Vojo" kaj „Transbajkala Laboristo" oni povas renkonti lastatempe diversajn artikolojn tradukitajn el ET kaj „Sennacieca Revuo". En multaj lernejoj de Ĉita ekzistas Esp.-rondetoj. Ankaŭ en Blagoveŝĉensk sur Amur-rivero oni povas atendi plivigliĝon de nia movado, ĉar en tiun urbon revenis el Moskva fervora s-ano Borisoglebskij.

N. Lesnikov.

Eŭropo.

Anglujo.

Cheltenham. Dum 1924 la societo revigligis kaj nun enhavas 51 membrojn. La 5 okt. paroladis s-o Merchant en YMCA-ĉambrego. Du kursoj kun pli ol 50 lernantoj ĵus komenciĝis, gvidas s-oj F. S. Garnick kaj W. M. Appleby. Ankaŭ en vilaĝo Minchinhampton post parolado de s-o Appleby stariĝis kurso. F-lino Partridge instruas 10 personojn.

Ĉeĥoslovakio.

Praha. F-lino instruistino J. Šupichová gvidas esperantan regulan rubrikon en la ĉeĥa porjunula gazeto „Malý Otenář" (Malgranda leganto). Cia redakcio kaj la eldonanto tre favoras Esperanton, kaj pli ol 150 lernantoj laŭ ĉi tiu rubriko (gramatika kaj kronika) lernas Esperanton.

Reichenberg. Kvankam la deviga lernado de la ĉeĥa lingvo malhelpas la instruon de Esperanto, tamen okazas en la urbo kelkaj kursoj. — Ankaŭ en YMCA, kies ĉi tiea estraro ne estas favora al Esperanto, gvidas fervora samideano kurson por junuloj. — Ĝoje ni konstatas, ke la Zentralverband der Angestellten (Ligo de geoficistoj en industrio, komerco kaj interkomuniko) serioze okupiĝas kun Esperanto, rekomendas kaj aranĝas kurson por komercistoj. — La ĵus fondita klubo de radioamatoroj elektis s-anon inĝ. Scholze en la estraron.

Germanujo.

Berlin. (Esperanto Gruparo.) En la septembra kunveno s-o telegrafdirektoro Behrendt parolis pri Esperanto kaj Ido.

Okaze de la kongreso de la lernejreformanoj kaj de la 25-a mond-pac-kongreso en Berlin oni aranĝis la 2 kaj 7 okt. en kafejo Josty senĝenajn kunvenojn. Ĉeestis kelkaj francaj samideanoj, s-oj Agourtine kaj van Etten, Paris, studkonsilisto Bonte, Frankfurt a. M. kip.

La 30 sept. Dir. Glück faris en Steglitz propagandoparoladon, aranĝitan de s-o Blankenheim. Kurso komenciĝis.

En la konata privata komerclernejo de Flatauer, Berlin, 5 esp. kursoj kun po 25 gelernantoj komenciĝas, gvidataj de s-oj Behrendt kaj v. Waldowsky.

La multelegata Radio-gazeto „Der Deutsche Rundfunk" depost 5 semajnoj jam regule aperigis esperantan kurson de s-o Behrendt, same en „Berliner Tageblatt" troviĝas en ĉiu sabat-vespera numero esperanta kurso de D-o Kliemke, Berlin, kiu multe helpas al la propagando.

Pri la Esp. propagando dum la pacokongreso vidu la specialajn raportojn.

La 10 okt. s-o Dir. Glück faris mallongan paroladon pri Esperanto en la rondo de la pacifistaj studentoj.

En la oktobra kunveno la 21 okt. instruisto D-o Tietsch parolos pri „Diagnozo per la okulo" kaj D-o Hanauer pri la organizo de la kongresoj. Por la novembra kunveno, la 18., D-o Kliemke promesis fari paroladon. *H. N.*

Bremen. Du kursoj komenciĝis en la metiista lernejo; unu kun 10 komencantoj, la alia kun 18 progresintoj. Instruas s-oj Gerke kaj Ehlers.

Delmenhorst ĉe Bremen. Kurso por komencantoj estis malfermata la 18 okt ĉe „Volksbund für Geistesfreiheit" (Popolligo por spirita libereco). Instruas s-o Gerke, Bremen; 16 partoprenantoj.

Erfurt. Post parolado de s-o Karl Steier okazas kurso, gvidas s-o Walter Weber.

Magdeburg. La grupo laboras fervore por la preparado de la venontjara Germ. Esp. Kongreso, al kiu ĝis nun aliĝis ĉ. 50 personoj. La 26. 9. s-o Direktoro Glück el Berlin faris publikan propagandan paroladon pri temo: Kio estas Esperanto? kun la sukceso, ke kelkaj novaj kursoj komenciĝos.

Potsdam. La 29 sept. okazis en Potsdam propagandvespero, en kiu parolis Dir. Glück pri la konstruo de Esperanto, instruisto Dieu pri Esperanto kaj la nuna tempo kaj instruisto Heinrich pri Esperanto en la 4a jaro de la fundamenta lernejo. Kurso en la popolalternejo denove estas anoncita, kiun gvidos instruisto Markau. *H. N.*

Hungarujo.

Györ. Dum la lasta monato ni sukcesis revigligi la movadon kaj nove fondi la grupon. Komenciĝis kurso kun 50 lernantoj. Granda propagando klopodas veki la intereson de la loĝantaro, kaj oni havas la certan esperon, ke Esperanto fariĝos baldaŭ kulturfakto en la vivo de la urbo. *G. St.*

Italujo.

Torino. Ĉe la Societo de junaj Skoltoj s-ano Carlo Agazzani gvidas novan kurson de Esp. En novembro okazos la oficialaj ekzamenoj.

Cagliari. Oni fondis novan grupon inter la fervojistoj, kiuj elektis la jenan estraron: Somma kav. Edoardo, prez.; Cabigiosu, Giulio, Filippi Azeglio, Rizzu Domenico, Zuddas Marjo, konsilantoj; Cocco Pietrino, kasisto; Contini Francesco, sekr. La grupo aliĝis al Nacia Fervojista Asocio, al kiu aliĝis ĝis nun naŭ naciaj grupoj.

Latvio.

Riga. Okazis reelekto de l' estraro de Riga Esp. Soc. Nova prezidanto: s-o Bergtals. Malfermiĝis 5 kursoj en diversaj urbopartoj, inter ili unu por poŝt- kaj telegrafistoj, gvidata de nova, sed jam lerta s-anino Balod. Unu kurso funkcias en la kastelo de l' Prezidanto de Latvia Respubliko. Pri la kongreso de Wien raportis ĉ. 15 gazetoj: latvaj, germanaj, rusaj, hebreaj; aperis 6 prikongresaj fotoj en latvaj ĵurnaloj; la artikolojn verkis precipe s-o E. Grot. Baldaŭ okazos la tradicia esp. aŭtunbalo kun koncerta parto.

Nederlando.

Helder (Esp. Grupo „Nova Sento"). Antaŭan monaton ni organizis ekspozicion kaj samtempe novan kurson. En la bioskopo estis montrita komunikaĵo pri ekspozicio kaj komenco de la kurso. Kune kun kelke da anoncoj kaj artikoloj pri Esperanto en la loka gazeto, la rezultato kontentigis nin, ĉar la ekspozicio estis bone vizitata kaj la nova kurso komenciĝis (je 1 okt.) kun 19 partoprenantoj; gvidas s-o Govers. La kursvespero estas merkrede. Je mardo ni havas konversaciajn vesperojn por la membroj kies programo estas kunmetita de komisio, i. a. kartludi, studi per vortoj, traduki artikolojn kaj ripeti ekzercaĵojn, devige lerni ekz. 25 vortojn, elparoli la historion de Esperanto kaj Zamenhof, kaj paroli per Megaskopo. Precipe la uzo de la Megaskopo (Ernemann-Lichtbildapparat el Dresden) estas tre bona instrumento por la ekzercado de parolo, ĉar estante en mahelo, oni havas pli multe da kuraĝo ol en lumigita ejo. — Helder kuŝas sur la norda parto de la provinco Nord-Holando (Nederlando) kontraŭ la insulo Texel (Teksel). *J. T. Kaptein.*

Leiden. La 9 okt. s-o Isbrücker parolis en publika kunveno en Het Volkshuis (Popoldomo), post kio sin tuj anoncis 15 p. por nova kurso. Poste anoncis sin ankoraŭ 5, por dua kurso 10 kaj por tria 30; krome kelkaj instruataj private. La kursojn gvidas s-oj Wesselins, P. J. Hoope, J. Massaar kaj private s-o Kolderman. En Noordwijk nova kurso de s-o Terbeek. La 15 okt. s-o Wesselins parolis pri Esp. en lernejoj dum gepatra kunveno en lernejo „Langebrug". Ĉeestis 40 p., okazis vigla diskutado. La rezultato estis, ke oni petis pritrakti tiun temon en la gepatra gazeto. S-oj Wesselins kaj Hoope promesis skribi kelkajn artikolojn.

Polujo.

8-a Kongreso de Pola Esperanto Asocio en Warszawa (7—8 septembro.)

(Rim. de red. Kvankam tiu ĉi raporto estas forsendita preskaŭ ses semajnojn post la kongreso kai pro tio tute malaktualiĝis, ni publikigas ĝin, konsiderante ke ĝi eble ankoraŭ interesas niajn polajn legantojn.)

Malfermis la kongreson en salono de higiena societo la prezidanto de organiza komitato s-o Jan Kostecki kaj proponis kiel prezidanton de la kongreso Prof. Odo Bujwid el Kraków; la propono estis unuanime akceptita. Post la parolado de Prof. Bujwid kaj salutparoladoj de reprezentantoj de diversaj societoj de Polujo kaj reprezentantoj de diversaj filioj de Pola Esp. Asocio sekvis pola parolado de D-o Karlsbad pri ĝenerala organizado de esp. movado.

Posttagmeze Prof. Czubrynski priparolis esperante la ĝisnunan staton de esp. movado en Polujo kaj la praktikajn problemojn de la movado. Post la diskutado aperigis diversaj proponoj, kiujn oni priparolis. La proponoj de s-o Zawada, 1. ke Pola Esp. Asocio sin turnu al la ministro de publika klerigo, ke estu permesite malfermi kursojn de lingvo Esperanto en lernejoj, kiam minimume 15 kandidatoj volos lerni la lingvon, 2. ke estu fondita informoficejo por konstanta informado de pola gazetaro kaj pola legantaro pri la stato kaj progreso de la esp. movado, 3. ke la enhavo de diversaj sciencaj artikoloj en polaj sciencaj gazetoj kaj ĵurnaloj aldonita france, angle aŭ germane en mallongitaj resumoj estu ankaŭ aldonita esperante. Poste sekvis proponoj pri fondo de centra esp. librejo kaj arĥivejo esperanta; pri fondo de propaganda fako; pri propagando per la radiokomunikado kaj organizado de la radiokursoj, propono pri kunvoko de la dua tutpola kongreso en Warszawa, propono ke dum la sekvonta kongreso estu nepre raporto pri la plenumo de la aprobitaj dum la kongreso proponoj; la propono de s-o Kostecki, ke en ĉiuj lokoj, kie estas pli ol unu societo esp., estu organizataj regulaj kunvenoj de la delegitoj de tiuj societoj; propono de poznanja delegito s-o Maliszewski pri enkonduko de Esperanto en la policservon kaj de aliaj ĉeestantoj pri enkonduko en telegrafkaj poŝtservon, kaj pri konstanta propagando inter la oficistoj laŭ decido de la 15-a kongreso en Praha, la propono ke Pola Esp. Asocio sin turnu al la registaro, ke en unuarangaj urboj de Polujo en telegraf- kaj poŝtoficejoj estu ankaŭ esp. surskriboj, propono de Pol. Esp. Asocio turniĝu al la urbestraro, ke la strato, kie laboradis la majstro en Warszawa, estu nomata Zamenhofa strato, propono, ke ĉe diversmanieraj societoj estu fondata fako de esp. junularo kaj speciale en la rondoj skoltaj; kaj propono, ke en la urboj, kie ekzistas kelkaj esp. organizoj, estu organizataj laŭeble komunaj kursoj.

Tiaj estis direktivoj, kies efektivigon la kongreso pritraktis kaj post voĉdonado pliparte akceptis. La kongreso plenumis sian koran devon, la kongresanoj komune iris al la tombejoj por meti grandiozajn kaj belegajn florkronojn sur la tomboj de l' majstro kaj de la neforgesebla esp. poeto Antoni Grabowski. Dum la daŭro de la kongreso la ekzamena komisiono ekzamenis la enskribitojn, kiuj ricevis la diplomojn por Esperanto-instruado. La kongresanoj vizitas la urbon, estis aranĝita komuna tagmanĝo kaj vespermanĝoj, komuna teatrovizito, kaj laste la organiza komitato aranĝis en salono de higiena societo speciale por la kongresanoj organizitan radioaŭskultadon.

Kraków. En ĉi-tiea ĉiutaga ĵurnalo „Kurjer Wieczorny" aperas ĉiusemajne fako „Esperanto" gvidata de Leo Turno. I. a. ĝi daŭre presigas esp. kurson kaj promesas premion al la plej bonaj lernantoj. La eldonanto de „K. W.", D-o Beres, estas ĝen. sekr. de Krakowa Komerca Ĉambro.

Esperanta Ekspozicio en Łódź.

En Lodza Salono de Arto en Sienkiewicza Parko okazis de 10—14 sept. granda Esperanta Ekspozicio aranĝita de kelkaj samideanoj. Ĝi havis la celon prezenti ne nur al la neesperantista publiko, sed ankaŭ al la lokaj esperantistoj la nunan staton de nia movado en ĉiuj ĝiaj branĉoj. Ĉie tie ni ŝuldos dankon pro kunhelpo al Danziga Esperanto Societo, Pola Esperanta Societo, Esperantista Societo „Laboro" filio en Łódź, Esp. Soc. Mojsije Paić en Zemun, Lejpziga, Wiena, Frankfurta kaj Reichenberga Foiroj. Entute la materialoj estis elmetitaj en ĉambregoj de la Artsalono afable disponigita al ni de la direktoro sinjoro Dienstl-Dybrosa. La ekspozicio kaŭzis en nia urbo grandan interesiĝon pri Esperanto kaj revigligitan fervoron ĉe la esperantistoj. La gazetaro kaj B. I. P. (informa gazeto servo) aperigis favorajn komunikojn kaj recenzojn.

Inter la multaj vizitantoj je la ekspozicio troviĝis ankaŭ la urbestro de Łódź s-o Cynarski kun sia edzino kaj reprezentantoj de la armeo kaj polico.

Ruslando.

Bobrujsk. S-o N. Povoroznik gvidas kurson por komencantoj kun 20 p.

Svedujo

Uddevalla. La 15 okt. s-o Kiellmann paroladis en bontemplana junulara asocio „Ivalde" en Vänersborg. 17 membroj enskribiĝis por kurso gvidota de s-o K. — „La Verda Stelo", klubo en Uddevalla, havis feston la 25 okt. kaj komencas kurson por komencantoj.

Esperanto en Lernejo.

Belgujo.

Koncentrigo de fortoj ĉie estas necesa por akiri la plej bonan rezultaton. Pro tio la 22 julio stariĝis la Antwerpena Poresperanto-Propaganda-Komitato. Jam kvar lokaj grupoj aniĝis: Suda Lumo, Nia Ideo, A. G. E. D. (Diamantista grupo), Verda Lumo kaj kelkaj individuaj esperantistoj.

Tiu komitato celante revivigi la ĉi-tiean movadon sukcesis favorigi la Skabenon de Publika Instruado por nia movado kaj akiri lian tutplenan kunlaboron por enkonduki Esperanton en la oficialan vesperlernejon. Kiel sekvo de tiu kelksemajna senĉesa propagando Esperanto estos do konsiderata same kiel aliaj fakoj sciencaj en tiuj lernejoj, kaj du kursoj kun 70 gepartoprenantoj komenciĝis la 17-an de nuna monato, gvidataj de oficialaj pagataj instruistoj.

Notinde estas, ke la urba servo mem algluigis nian propagandan afiŝon ĉe la lernejaj muroj, fakto neniam permesata en nia urbo por kia ajn celo.

La Esperanto-ekspozicio, okazinta de 8—25 sept. en la urba informejo, montris al miloj da preterpasantoj en la plej centra strato de Antwerpen la viveblecon kaj progresadon de Esperanto. *A. P.*, Antwerpen.

Germanujo.

Esperanto kaj blinduloj.

La unua blindula kongreso en Stuttgart en aŭgusto jam akceptis rezolucion favoran al fakultativa enkonduko de Esperanto en blindulernejoj germanaj. Proponon faris D-o Strehl de Marburg (Lahn).

Magdeburg. En Reallernejo komenciĝis kurso de 32 knaboj kun ilia profesoro, instruataj de instruisto Wottrich. En komerca privatlernejo de Bruck jam depost kelkaj jaroj Esperanto estas instrua fako; ĝi estas ĉi tie la unua komerca lernejo, kiu enkondukis Esperanton.

Alvokoj.

Esperanta Kolportista Asocio London.

La 7 nov. okazos nia unua fondiĝfesto. Dum la pasinta jaro ni disdonis pli ol 5000 libretojn, evangeliojn, gazetojn ktp. kaj nun havas korespondantojn en pli ol 50 landoj. Ni esperas daŭrigi nian propagandon kun pli forta penado dum la venonta jaro, kaj ĝoje kaj dankeme ricevus helpon de samideanoj, kiuj interesiĝas je nia propagando.

Oni povas sendi poŝtmarkojn, gazetojn aŭ aliajn aĵojn al la sekretario (Livingstone Jenkins) Esperanta Kolportista Asocio, 64 St. Thomas Road, Finsbury Park, London N. 4, Anglujo.

Korekto.

En ET 210, p. 1, „Biologio, Evoluo de seksoj", enŝoviĝis kelkaj preseraroj, kiujn necese estas korekti. Do oni legu: semogeneraj (anst. semogenesaj), spermocitoj (anst. spermocioj), tubetoj (anst. kubetoj), spermozooj (anst spermocooj). *A. E.*

Por efektivigo de naci-ekonomia kaj financ-scienca problemo ni organizas en monato januaro 1925

Vojaĝon de studo kaj orientiĝo

al Egiptujo kaj speciale al la regiono de Sinajo. Tre grava afero por financistoj kaj firmaoj. Sinjoroj kaj sinjorinoj interesiĝantaj pri koncernaj detaloj senpage ricevas informojn de

G. Dubach, Bissone-Lugano, Svislando.

La iam multŝatata Revuo

Espero Katolika

Honorita per la Apostola Beno

Denove eliras kun nova gvidanto

Pastro G. Ramboux en Paris.

Jarabono: 20 francaj fk. (10 sv. fk.)
Provnumero: 2 francaj fk. (1 sv. fk.)

Administracio:
F-lino Larroche,
55, rue de Vaugirard, Paris (VI).

Tuj mendu!

Anoncetoj.

POLLANDA KOMERCA ARGENTEJO Warszawa, Krak-Predm. 10, Adolfo Oberrotman, deziras eniri seriozajn komercrilatojn kun gravaj firmoj, kiuj deziras vendi aŭ esti reprezentataj en Pollando, aŭ eventuale malfermi tie stokon por povi pogrande vendi la komercajon. [4

POR ZAMENHOF MONUMENTO. En fino de novembro oni intencas aranĝi vastegan esperantan ekspozicion en granda ekspozicia salono; oni insiste petas ĉiujn samideanojn se eble tuj alsendi diversajn reklamilojn, afiŝojn, gvidlibrojn, ornamaĵojn, gazetojn ktp. por plibonigi la ekspozicion, la tuta enspezo iros al la Loka Monumenta Komitato, la sendaĵojn oni alsendu al la del. de UEA samideano A. Oberrotman, Warszawa, Krak-Predm. 10. [5

KOMERCOFICISTO, 38-jara, plej bonaj atestoj, serĉas iun ajn laboron. W. Duregger, Traunstein, Scheibenstr. 26, Bavario. [2

PETO! La tero estas fruktodona. Sed ni devas havi semon. Sen semo, sen materialo por semi ni nenion povas. Do, ni petas samideanojn kaj redakcioj, ke ili sendu malnovajn numerojn de gazetoj kaj fratojn japanajn ni petas sendi ankaŭ ion al ni. PK bfl. Sendu al: Pavas Dravol, plektisto, Daruvar, Jugoslavio. [2

Letervespero estas aranĝota 25 novembro por pruvi al niaj samurbanoj, kiom estas disvastigita Esperanto. Ĉiu leganto estas petata sendi almenaŭ PK. Respondon ricevos, kiel eble plej baldaŭ, ĉiu sendinto. Adresu nur: Grupo Esperantista de Orebro, Svedujo. [2

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Jugoslavajn, bosniajn, hungarajn PM mi sendas por eŭropaj laŭ katalogoj Yvert aŭ Michl. Ne sendas unue. Ne deziras bagatelaĵojn. Béla Špitzer, Del. de UEA. Subotica S H. S., Jugosl. Holzwaren-Fabrik. [2

S-o Felix Ziemann, instruisto, Rotschaŭ ĉe Reichenbach i. V. Germanujo, deziras korespondi kun eksterlandanoj per il. PK bfl. kaj L pri iuj temoj (socia vivo, pedagogio), ĉiam tuj respondos. [2

S-o W. Lorenz, portmetia instruisto, Reichenbach i. V., Germanujo, deziras korespondi kun eksterlandanoj per il. PK kaj L pri iuj temoj, ĉiam respondos. [2

S-o Franz Petter, Falkenaŭ-Kittlitz n-o 21, deziras interŝanĝi L, PK, PM, escepte kun germanoj. [2

S-o Władysław Zdaniewicz, poczta Wiel. kie Soleczniki ziemi Wileńskiej, Pollando deziras korespondi kun ĉiu landoj per il. PK kaj L, ankaŭ interŝanĝi papermonon kaj PM, ĉiam respondos certe. [1

Laŭlege deviga teksto germanlingva: Verlag und Druck (Eldonejo kaj Presejo): T. & H. Jung, Horrem bei Köln. Verantwortlicher Schriftleiter (Respondeca Redaktoro): Teo Jung, Horrem b. Köln.